
Nia Voĉo

Ekzempleroj: 175 Organo de Madrida Esperanto-Liceo Januaro de 1990

## FLANDRA VIZITINTO

Dum novembro vizitis nian grupon esperantisto el Belgio (Flandrujo). Li parolis al ni pri la belga movado.



## ESPERANTAJ LIBROJ ĈE NACIA BIBLIOTEKO



Nuntempe Nacia Biblioteko ne havas ĉiujn esperantajn librojn eldonitajn en Hispanio. MEL petis la komputor-liston pri la libroj, sed bedaŭrinde ĝi enhavas multajn erarojn, multajn librojn ne-esperantajn. MEL petis ke la listo estu korektata, sed verŝajne, same kiel ĉio en Hispanio, tio okazos nur post 1992! Tiu problemo, ĝis sia solvo, estas inter la taskoj de MEL, kiu regule rememoros la aferon al Nacia Biblioteko.

## GENERALA ASEMBLEO


La venonta ĝenerala asembleo okazos la 29-an de januaro en la sidejo de MEL je la 19-a horo. Por mallongigi la daŭro de la asembleo oni antaŭdiskutos la diversajn punktojn en la konversaciaj rondoj kiuj okazas ĉiun lundon je la 19-a horo:

1.- Aprobo aŭ malaprobo de la antaŭa protokolo (Vidu pasintan Nia-n Voĉo-n de marto). Antaŭdiskuto la 18-an de decembro.
2.- Resumo de MEL-aktivaĵoj dum 1989 (Vidu lastan Nia-n Voĉo-n). Antaŭdiskuto la 8-an de januaro.
3.- Bilanco de 1989 (vidu tiun ĉi Nia-n Voĉo-n).
4.- Buĝeto de 1990 (vidu tiun ĉi numeron). Punktoj 3-a kaj 4-a estos antaŭdiskutataj la 15-an de de januaro.
5.- Venonta programo de MEL (preskaŭ samo ol punkto 2-a). Antaŭdiskuto la 8-an de januaro.
6.- Elekto de novaj estraranoj.
7.- Demandoj kaj komentarioj. Punktoj 6-a kaj 7-a estos diskutataj la 22-an de januaro.

La interesiĝantoj pri la diversaj punktoj sciu, ke estas prefere antaŭdiskuti en la fiksitaj tagoj. Se iu havas komentariojn rilate diritajn punktojn, bonvolu veni al la konversacia rondo la taŭgan tagon aŭ skribi leteron al MEL.

## PAGO DE L' KOTIZO DE 1990

Se vi deziras faciligi la laboron de nia kasisto, bonvolu pagi vian tutjaran kotizon (1800 pesetojn). Vi povas sendi ĉekon je la nomo de Madrida Esperanto Liceo.



## KURSOJ EN EKSTRE-MADURO

Nia samideano *José Gonzàlez* gvidas en *Badajoz* 7 bazajn kursojn por pli ol 200 gelernantoj (inter ili, 27 geinstruistoj pri *E.G.B.* kaj 76 gestudentoj de la lernejo pri Instruado. Antaŭen, *José*!

## DENOVE *LORCA*

La pasintan novembron, *Miguel Fernàndez* partoprenis en la programo *"La Bisagra"* de *Radio Nacional*. Li legis diversajn tradukaĵojn de *Lorca* al Esperanto.



## VIGLA MOVADO EN SEGOVIO

Nia kara samideano *César Mosteyrin* sendis al ni leteron pri sia grupo el Segovio. Kunvenas 4 aŭ 5 personoj ĉiun merkredon en *"Casa del Deporte"* kaj, laŭ li mem rakontas, la grupo boletas. Li mem propagandigas Esperanton en siaj ekskursoj: pirogado laŭ rivero *Duero*, pilgrimado al *Alba de Tormes*, restado en la marbordo de Malago kaj ankaŭ vojaĝo tra Francio. Antaŭen, *César*, oni bezonas tiajn esperantistojn!

SOCIOLOGIA ENKETO

# La profilo de meza esperantisto

Okaze de la Hispana Esperanto-Kongreso okazinta en 1987 en Madrido, inĝ Juan Carlos Ruiz prilaboris sociologian enketon inter la partoprenantoj, kun la celo koni la konsistajn trajtojn de la hispana Movado.

La rezultoj de lia esploro de la 350 kongresanoj estas nur nun diskonigitaj; ili respegulas ne nur la facetojn de la hispana Movado, sed ankaŭ tiujn de pluraj aliaj landaj Movadoj.

La esploro disvolviĝis per skriba enketilo, al kiu respondis iom malpli ol 18% de la kongresanoj, inkluzive de eksterlandanoj (kvinono de la respondintoj). La demandoj celis koni la aĝon, studojn, konatajn lingvojn kaj sintenon al Esperanto. La lasta punkto rilatis al la opinio pri la interna ideo, al la ĉefa argumento por Esperanto, al libro-aĉetado, al abonado al revuoj kaj al kongresaj programoj.

El la ricevitaj respondoj montriĝas jeno. La meza aĝo de la enketitoj estas tre alta, 54 jaroj, eble pro manko de kongresaj programoj interesaj por gejunuloj. La instruitec-nivelo aspektas kontentiga: ĉ. 38% deklaras universitatajn studojn, 34% mez-gradajn kaj la cetero elementajn. Alia faceto de la instruiteco estas la kono de fremdaj lingvoj: preskaŭ 39% konas korekte aŭ bone 2-3 lingvojn, dum 45% konas nur Esperanton kun eventuala aldono de unu alia lingvo; la cetero de la enketitoj posedas nur elementajn aŭ neniujn konojn de fremda lingvo.

Koncerne la internan ideon, 82% opinias, ke ĝi estas kerna aŭ grava aspekto de la esperantismo ( 43% pensas, ke dank' al ĝi Esperanto vivas kaj progresas, kaj 39%, ke ĝi estas grava por la internacia lingvo); la aliaj 18% aŭ ne respondas al la demando aŭ opinias, ke ĝi ludis rolon nur en la komenca periodo; iuj opinias, ke ĝi nur malfavoras Esperanton.

Rilate al la argumentado por la internacia lingvo, la pragmatisma sinteno larĝe superas la idealisman: fakte 65% substrekas la valoron de Esperanto por internacia komunikado kaj disvastigo de la kulturo, krom por atingi gravajn ekonomiajn ŝparojn en la tutmondaj rilatoj.

72% legas pli ol du librojn jare en la nacia lingvo, 21% nur unu aŭ du, 8% neniun. Pri la Esperanto-literaturo: ĉ. 55% legas pli ol du librojn jare en Esperanto, 34% unu aŭ du, 11% neniun.

Pli ol kontentiga aspektas la situacio rilate al la gazetaro, ĉar preskaŭ 84% abonas Esperanto-revuon.

Sufiĉe viglas la kontaktoj kun eksterlando pere de Esperanto: 69% de la respondintoj havas eksterlandan korespondanton.

Ni alvenas al la punktoj pri la Esperanto-kongresoj. La ĉefaj motivoj por partopreni en ili estas diversaj, sed por 61% ĉefas la laboro kaj la lingvo-praktiko (37% deziras unue labori por la disvastigo de la lingvo, 24% utiligi Esperanton kaj aĉeti librojn); tre signifaj 34% preferas kongresi por ferii en agrabla etoso kun amikoj.

Ankaŭ la sinteno al la kongresaj programoj rezultas malunueca, kvankam la plejmulto (63%) preferas artajn kaj kulturajn aktivaĵojn; envere aliaj 27% deziras partopreni en labor-kunsidoj (diskut-grupoj, fakaj kaj asociaj kunvenoj, ktp.)

Konklude, el la enketo eblas konstati, ke la esplorita esperantistaro, kvankam ne tre junaĝa, pragmatisme rilatas al la argumentado por Esperanto (la interna ideo restas interna valoro, sed por la ekstera informado estas uzataj aliaj argumentoj). Parto de la enketitoj videble nur utiligas la lingvon, dum aliaj ankaŭ laboras por ĝia disvastigo. En ĉiu kazo, la libro-legado kaj gazet-abonado atingas superajn nivelojn.

La nuna enketo meritas atentan analizon, komparon kun aliaj studoj (ĉefe tiu de Foster) kaj adopton por aliaj similaj naciaj esploroj.

Remite:
Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98 4°
28012 MADRID

## PUBLIKA KUNVENO DE HEF, LA 2-AN DE DECEMBRO DE 1989

- **Desegno kaj nomo de** *Boletîn***:** Estas eble ŝanĝi la nomon "*Boletîn de la Federaciòn Española de Esperanto*" kaj ĝian ŝajnon. Oni proponis kelkajn desegnojn por la ŝajno de la nomo. Ĉe duono de januaro aperos nova numero.

- **Revizionto pri poezio:** S-ro *Alonso Nûñez* proponis S-ron *Miguel Fernàndez* kiel revizionton pri poezio sendata al *Boletîn*.

- **Amas-komunikiloj:** oni priparolis eblojn ĉeesti en amas-komunikiloj. Kiam ajn ekestos ebloj tion fari, oni devos kontakti kun la loka grupo; neniu iru sole ne-avertinte lokan grupon, por ke prefere ĉeestu nur la plej adekvataj personoj.

- **Eldonado de apogiloj:** ĉu eldoni ilin Esperante kaj hispane, aŭ nur regionlingve?. Tio estas grava afero, ĉar per tiuj apogiloj oni klopodos atingi monajn apogantojn por HEF inter gegravuloj.

- **Ekspluatado kaj financado de la centra oficejo:** HEF nun havas deficiton kaj ne povas helpi al la centra oficejo. Eble dum la venonta jaro oni ricevos subvencion kaj povos doni ion por ĝi.

- **Flegade de kunlaborado kun homoj kaj grupoj ne-apartenantaj al HEF:** S-ro *Cabezas* informis pri kunlaboro de Portugala Esperanto-Asocio kun la Delegacio de Ekstremaduro: kelkaj geportugaloj partoprenas ĉe HEF-kongresoj. PEA oferis Lisbonon kiel post-kongresan urbon de la Merida Kongreso, kiu okazos en 1992.

- **Partopreno de HEF en EXPOLINGUA-90 surbaze de Madrida Esperanto-Liceo:** MEL organizos standon kaj inform-servon dum la foiro. Oni devas prepari prezentadon aŭ debaton pri Esperanto. Ĝis nun, S-ro *Alonso Nûñez* kontrolas la aferon.

- **Informo pri ecoj ecoj de la nun ekzistantaj lerno-libroj:** HEF prezentos informon de specialisto rilate al la kvalito de la nunaj diversaj metodoj (elementaj, bazaj kaj superaj). S-ro *Alonso Nûñez* petas de ĉiuj geinstruistoj informojn pri la uzataj metodoj.

- **Instruistoj kiujn HEF disponas por kampanjoj laŭ diversaj niveloj:** Sr-o *Alonso Nûñez* dissendos enketon por koni kapablecon kaj disponecon. La instruado de geinstruistoj estas grava; nun oni ne disponas sufiĉe da ili. Rilate al la Fakultatoj pri Pedagogio kaj al la Institutoj pri Edukado, estas necese, ke ili pagu al geinstruistoj pri Esperanto.

- **Novaj kongresoj en Hispanio:** S-ro *Augusto Casquero* bedaŭris la mankon de apogo por la organizado de U.K. en 1993. Li petis monan helpon, ĉar oni devas oferi ioman sumon kiel "garantion" al UEA. Li diris ankaŭ, ke eĉ UEA ne montras sian apogon: oni ne ricevis leteron kun la oficiala akcepto de la kongreso en Valencio. Li prezentis liston da 20 personoj, kiujn li bezonos unu jaron antaŭ la kongreso por serioze labori. Rilate la hispanajn kongresojn estas deziro de S-ro *Alonso Nûñez* plialtigi la nivelon: Kongreso de 1990: *San Cugat del Vallés*, pri kiu, pro diversaj kialoj, la LKK havas grandajn organizajn problemojn; oni petas helpon kaj aliĝojn. Kongreso de 1991: eble en *Santiago de Compostela*. Kongreso de 1992: la urbestro de *Mérida* oferis sian urbon.

- **Eldon-plano por la jaroj 1989-1983:** S-ro *Alonso Nûñez* proponas jenajn eldonaĵojn: lirika hispana poezio, por kiu oni petos subvencion de la Ministerio pri Edukado; hispan-amerika folkloro (muziko kaj kantoj), por kiu same oni petos subvencion; nova baza metodo de Esperanto (verko de S-ro *Alonso Nûñez*), por kiu oni serĉas eldoniston; 2000 paĝoj de teknikaj libroj por la antaŭuniversitataj kursoj; diversaj turismaj broŝuroj laŭ peto de Ministerio pri Turismo kaj por la U.K. de Valencio; inform-flug-folio hispanlingva rilata al Esperanto, 10000 ezempleroj por *EXPO-92*.

- **Kampanjo inter geparlamentanoj kaj aliaj gegravuloj:** Oni sendos al eŭropaj kaj aŭtonomaj geparlamentanoj inform-broŝuron pri antaŭ-universitataj kursoj laŭ la eŭropaj projektoj *ERASMUS* kaj *LINGUA*.

- **Dankoj kaj omaĝo al pluraj gravaj ge-HEF-anoj:** S-ro *Alonso Nûñez* proponas jenajn nomojn: *Aragay, Mayó, Guma, Flores, Aboîn, Lupe, Soler* kaj *Gastòn*. Sr-o *Aboîn* same nomas S-ron *Figuerola*.

- **Informo de la prezidanto pri siaj demarŝoj ĉe la Ministerio pri Edukado kaj ĉe la Universitato de Santiago pri sia projekto pri inaŭguro en 1993 de Internaciaj Antaŭuniversitataj Somer-kursoj en Esperanto:** Oni promesis subvencion de 200000 pesetoj por la eldonado de inform-broŝuro (2000-3000 ekzempleroj) pri la kursoj Esperante kaj hispanlingve. La Universitato de *Santiago* donos, en 1990, 50000 pesetojn monate por elspezoj de HEF-prezidanto, kaj eble 500000 pesetojn se la kursoj ekfuncios. Oni devas unue prepari geinstruistojn, kiuj poste instruos al gelernantoj de la antaŭuniversitataj kursoj. Dum la kunveno oni balotis kaj akceptis meti tiun programon en la planon de HEF por la venontaj 3 aŭ kvar jaroj.

- **Informo pri junularo:** S-ro *Alonso Núñez* diris, ke HEF helpos al HEJS se al ĝi oni prezentos seriozan labor-planon. Li invitis al HEJS fari programon por hispana kongreso alloga por la junularo, kaj oferis al HEJS paĝojn de *"Boletín"*. S-ro *Franco* diris, ke la antaŭa redaktoro de *"Boletín"* ne publikigis la artikolojn senditajn de HEJS. HEF nuntempe havas deficiton, sed ĝi pagos tiel frue kiel eble 30000 pesetojn al HEJS por eldoni la staplitajn numerojn de HEJS-bulteno kaj "La mano".

- **Petoj kaj demandoj:**

S-ro *Muñiz* deziras pli da apogo por atingi la premion *Príncipe de Asturias de la Concordia* por UEA. S-rino *Urueña* petis al li atendi por peti denove la premion. Estas prefere havi la dosieron pri Esperanto kaj HEF, kiun oni preparas por atingi la deklaron de publika utileco por HEF.

*Lupe* demandis pri la loterio de HEF, kiun oni ne faris en 1989. La prezidanto preferas atingi monon pli rapide kaj sen tiom da laboro. *Augusto* oferis sin por fari loterion la venontan jaron. *Lupe* demandis ankaŭ, ĉu la karavano al Kubo, kiun organizas S-ro *Azcuénaga*, estas oficiala de HEF aŭ ne. S-rino *Urueña* informis, ke UEA elektis *Iberia*-n kiel flug-kompanion (Kuba Esperanto-Asocio rekomendas "*Cubana de Aviación*"-n). *Lupe* sugestis, ke HEF parolu kun *Iberia* por profiti la elekton de hispana flug-kompanio kaj atingi bonan prezon por hispanoj. Ŝi diris ankaŭ, ke, se la telefon-numero de la centra oficejo aperos en la oficialaj paperoj de HEF, oni devos instaligi aŭtomatan respondilon; S-ro *Alonso Núñez* rediras, ke nun ne estas sufiĉe da mono; *Lupe* sugestas, ke eble iu trovos doun-uzitan aparaton anoncinte la aferon per *Boletín*.

S-ro *Hernández* proponas plioftigi la ĉeeston de geesperantistoj ĉe televidaj programoj, ekzemple ĉe "*El tiempo es oro*" (*Antonio Marco, Ricardo F. Albert, A. Martín*).

S-ro *Alonso Núñez*, kiel HEF-prezidanto, dezirus fari vizit-rondon ĉe esperantaj grupoj. S-ro *Hernández* proponas, ke la grupoj, kiuj dezirus esti vizitataj, devus kontakti kun S-ro *Alonso*, ĉar la afero povas esti multekosta por la plimulto el la grupoj.

- Je la 20-a kaj duono oni finis la publikan kunvenon. La estraro de HEF poste kunvenis private.

KLUBO DE ESPERANTO
ATOCHA, 98, 4.°
MADRID-12

Ne oficiala resumo farita de Lupe Sanz kaj Marcos Cruz

# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: 175 Februaro de 1990


**INFORM-FLUG-FOLIO.**

MEL, eble pere de HEF, faros propagandan flugfolion hispanlingvan pri Esperanto. Oni deziras aperigi adresojn de ĉiu esperanta grupo kiu aktive kaj reale funkcias en Hispanio. Se via grupo estas tia, bonvolu sendi al MEL vian korektan adreson antaŭ la 19-a de februaro.

**HEF en Madrido.**

Oni petas al ĉiuj esperantaj grupoj, bonvolu sendi siajn revuojn, bultenojn, kaj informojn al HEF-oficejo de Madrido: *Federación española de Esperanto, Rodríguez San Pedro 13 3º, 28015 Madrid.*

**Koruso "Verda Stelo".**

La esperanta koruso "Verda Stelo" tre sukcese partopprenis en la kristnaska kant-konkurso organizita de Madrida Urbestraro. Dum kristnaskaj festoj, ĝi ludis en *Soria*, invitita de la Provinca Diputacio, kaj kantis ankaŭ dum la Kristnaska meso en la preĝejo Sankta Kruco.

Kelkaj membroj de la koruso kaj orkestro kune kun diversaj invititoj partoprenis en la konkurso de *"migas"* en Jadraque (Guadalajara). Rosa kuiris bonan potegon kaj ĉiuj amuziĝis dum la suna tago.

**Novaj membroj de MEL.**

Dum 1989 membriĝis al MEL jenaj samideanoj:

*Lucrecia San Antonio.* La plej malnova esperantistino de Madrido. Ŝi esperantiĝis antaŭ pli ol 50 jaroj ĉe *Ateneo de Madrid*, kie ŝi poste instruis kune kun S-ro *Mangada*. Nun ŝi gvidas konversacian rondon ĉiumonate ĉe *Ateneo*. Ankaŭ ŝia patro, D-ro *San Antonio*, estis grava esperantisto.

*Neftalí Mulas.* Li estas instruisto ĉe Ciudarealo, kaj malnova esperantisto. Bedaŭrinde, en lia urbo ne ekzistas esperanta grupo.

*Carlos Andreu.* Madridano kiu havas multajn esperantajn korespondantojn en diversaj lokoj. Li kutime partoprenas en niaj konvesaciaj rondoj.

**Karavanoj al U.K. de Kubo.**

*ULTRATUR S.A.* (986-333812/60). Pere de *Juan Azcuénaga*; 21 noktojn; Kubo plus *Disneyworld*: "duonpensione" en Usono, "kompletpensione" en Kubo. Prezo: 305000 pesetojn.

*VIAJES MINOTOURS S.L.* (985-219790/222912). 21 noktojn; Kubo; nur matenmanĝo. Prezo: 167500 pesetojn.

*CUBANA DE AVIACION.* Oficiala flugkompanio de Kubo, kiu oferas rabaton en siaj flugoj dum julio; oni povas vojaĝi unuope po 110000 pesetoj, ire kaj revene; oni nepre bezonas aliĝon al U.K. Pridemandu al via vojaĝa agentejo.

MADRIDA ESPERANTO-LICEO petis al *POLITOURS* buĝeton por vojaĝo al U.K. plus turneo al Peruo. Ni devas atendi la turisman foiron *FITUR-90*, kiu okazos je la fino de januaro.

## VENONTAJ PROGRAMOJ

5-an de februaro (lundo): prelego "Tra la mondo per Esperanto", de *Maritza Graziani*, ĉe MEL je la 19-a horo.

21-an de februaro (merkredo): konvesacia rondo *"Amigos del Esperanto"*, ĉe *Ateneo de Madrid*, strato *Prado* 21, je la 19-a horo.

22-an de marto (ĵaŭdo): prelego kun lumbildoj "Hispana folkloro", de *Lupe Sanz*, ĉe *Rodríguez San Pedro* 13 3° 7, je la 19-a horo.

Ĉiulunde okazos konversacia rondo ĉe MEL je la 19-a horo. Oni kunvenas ankaŭ ĉe *Rodríguez San Pedro* 13 3° 7, ĵaude.

Telefonnumero pri novaj kursoj: 4468079, vespere.

---

*"¡Pueblos, realizad el deseo de los sacerdotes de Egipto en favor del establecimiento de un idioma único que unirá a todos los hombres!"*

*Pitágoras, siglo VI A.C. "La sabiduría pitagórica", página 93. Federico Marcé y Eduardo Alfonso, Editorial Orión, México 1980.*

---

## Intelatoraj aferoj.

Far Marko




---


Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98 4°
28012 MADRID

N I A   V O Ĉ O

Ekzempleroj: 175   Organo de Madrida Esperanto Liceo   Marto de 1990

PRELEGO ĈE MADRIDA ESPERANTO LICEO

Kadre de la ĉiumonataj prelegoj la lundon 5-an de februaro okazis ĉe la sidejo de MEL interesa prelego titolita "Esperanto tra la mondo". La prelegantino estis ĉi-foje nia samideanino el Venezuelo Maritza Graziani, kiu kun sia kutima eleganteco priparolis propan sperton en Izraelo, vizion de la tieuloj, sian laboradon en laborgrupo, Esperanto-movadon en tiu lando, kaj sian uzadon de nia internacia lingvo tie, mirinda ilo por la interkompreno de homoj kaj popoloj. Ĉeestintoj atente aŭdadis nian samideaninon, dum ili admiradis ekspoziciitajn librojn, gazetojn kaj prospektojn koncerne al Esperanto-movado en Izraelo; esperantlingva eldonaĵo de Malnova Testamento elstaris. Tuj kiam la prelego finis, Maritza regis ankaŭ belajn kantojn esperante, akompanitajn de venezuela muzikilo en agrabla etoso.

V O J A Ĝ O   A L   K U B O

MEL petis buĝeton al Politours por iri al U.K. de Kubo. Ili provizore donis jenan: 17 tagoj: KUBO (duona pensiono) plus PERUO (nur matenmanĝo)= 285.000 pesetojn. Se vi estas interesata bonvolu urĝe sendi vian adreson al MEL. Ni nur korespondos kaj sendos pliajn informojn rekte al geuloj interesataj. La prezo eble altiĝos ĉar la taĝoj en Peruo estos pli ol unu semajno. Ni bezonas 15 gegravuloj por nia grupo.

KVINA ADVENTA FESTO DE F.E.J.O.

Jorge Camacho dum sia restado en Finnlando por lerni la finnan lingvon partoprenis en la festo kiun organizis Finna Esperantista Junulara Organizo. Li gvidis kurseton pri la hispana lingvo.

ĜENERALA ASEMBLEO DE MEL

Je la fino de januaro okazis la ĝenerala asembleo de MEL, kiun partoprenis 9 geanoj (MEL havas 70 membroj kiuj regule pagas sian kotizon). Kune kun la pasinta NIA VOĈO ni sendis kopion de protokolo, ni atendas komentariojn ĝis la 31-an de marto.

NOVA REDAKTORO

Ekde tiu ĉi numero de Nia Voĉo, okupiĝos pri redaktado de nia bulteno Carlos Andreu, la nova estrarano de MEL. Marcos Cruz daŭre tajpos kaj aranĝos komputore la revuon.

Tiu-ĉi numero ne aperas komputile ĉar la teksto sendita de Marcos estis tiel malnigra ke oni ne povis fari fotokopion. Lupe retajpis.

ATENEO DE MADRID

Jam oficialiĝis ĉe Ateneo konversacia rondo "Amigos del Esperanto", kiu okazas ĉiu monate, trian merkredon, en la salono "La Cacharreria". Ni atendas vin. Gvidas tiun rondon Lucrecia San Antonio, la plej antikva esperantistino de Madrido, Kiu esperantiĝis ĉe Ateneo

VENONTAJ PROGRAMOJ

Konversaciaj rondoj: ĉiulunde je la 19.00 horo ĉe MEL. Atocha 98-4º
ĉiujaŭde je la 19.00 horo ĉe HEF. Rodriguez San Pedro 13-3º

En marto:(ĉiam je la 19.00 horo )

12-an ĉe MEL. Miguel Fern'andez prelegos "Sur la spuro de F. García Lorca"

19-an Dua parto de la prelego de M. Fernández pri Lorca

22-an ĉe HEF-Oficejo. Lupe Sanz prelegos pri "Hispana folkloro"

24-an Ekskurso al Segovio (Renkontiĝo kun la segoviaj esperantistoj)

En aprilo:

23-an ĉe MEL. José Mª González Aboín "Mapoj kaj geografiaj nomoj"

En majo:

21-an ĉe MEL Carlos Andreu prelegos pri sia "Vojaĝo al Budapeŝto kaj Vieno"

MEL KOTIZOJ POR 1990

Ni petas al ĉiuj membroj kiuj ankoraŭ ne pagis siajn kotizojn por 1990, bonvolu sendi ĉekon po 1.800 pes je la nomo de Madrida Esperanto-Liceo Se vi preferas vi povas sendi 2.000 pesetojn /200 kiel donaco)

NOVAJ KURSOJ

Casa de Cantabria. Plaza de España 18. Lundo, merkredo kaj jaŭdo je la 19.30 horo.
Gvidas Tomás Ortiz

Asociación Espirita. Puerta del Sol 14-3º izda. Lundo kaj jaŭdo je la 2030 horo.
Gvidas Fernando del Moral.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98. MADRID - 28012

# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: Aprilo de 1990


**MEL-KOTIZO POR 1990**

Ni denove petas al ĉiuj membroj kiuj ankoraŭ ne pagis siajn kotizojn por 1990, bonvolu sendi ĉekon po 1800 pesetoj je la nomo de Madrida Esperanto-Liceo. Se vi preferas, vi povas sendi 2000 pesetojn (200 kiel donacon).

**TURISMA SERVO DE HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO**

Ni informas vin, ke ekde la 1-a de novembro ekfunkcias ĉe Hungara Esperanto-Asocio:

"Espertur" - Turisma servo de HEA
*1368 Budapest Pf. 193*
*Budapest I. Szentháromság tér 6*
Telefonnumero: 156-0244

Oni donos turismajn servojn por eksterlandaj kaj enlandaj esperantistoj, krome ili volonte kunlaboros kun vojaĝ-oficejoj, kiuj utiligas en sia laboro Esperanton.

Oni povas oferti por gastoj en Budapeŝto tranoktejon en ĉiu kategorío, de luksaj hoteloj ĝis privataj malmultekostaj ĉambroj.

**ESPERANTA KASTELO**

La kastelo funkcios ekde la 11a de aprilo ĝis la 31a de aŭgusto. Kelkaj liceanoj jam somerumis tie, kaj oni rekomendas ĝin por somerumi malmultekoste kaj koni la belan regionon tiean.

Adreso: Kultura Esperanto-domo
*Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, Francio*




Madrida Esperanto Liceo faris propagandajn T-ĉemi-sojn.

Prezo 600 pes
Rabato 20% (pli ol 20 ejempleroj)

Antaŭ pago necese. pere de ĉeko je la nomo de Madrida Esperanto-Liceo. (Sendokosto 10%. ĉekoj ekster Madrido bv. sendu 300 pes pli.)

**KORESPONDI DEZIRAS**

PETR KOUBA, 24-jara, fraŭlo, kun knabinoj de 18- ĝis 25-jaraj, pri sportoj, filmoj, rokmuziko, turismo, ŝakludo. Sobéslavská 259, Ĉernovice, CS-39494 ĈEĤOSLOVAKIO

LUCIE SMETANOVA, 14-jara, knabino, pri ĉiaj temoj, kun gesamaĝuloj. Otavská 21, Ceske Budejovice, CS-37011 ĈEĤOSLOVAKIO

SEGBEDJI EKOUE, 19-jara, lernejano, pri ĉiaj temoj. B.P. 61 296 (Bè) Lomé, Togo, TOGOLANDO.

IGLIKA COKOVA, 17-jara, knabino, pri lingvoj, muziko (ŝi ludas pianon) kaj sportoj. Stará Zagóra 6000, Lenin 5 A-8, BULGARIO

---

**HUMORO**

-Ĉu estas vere, onklo, ke vi estas 110-aĝa?
-Certe!
-Kiamaniere vi atingis tiun altan aĝon?
-Nu, mi havis paciencon!

---

**VENONTAJ PROGRAMOJ**

Konversaciaj rondoj, je la 19a horo:
Ĉiulunde ĉe MEL.
Ĉiuĵaude ĉe HEF-oficejo.
18an de aprilo ĉe *Ateneo* (strato *Prado* 21)

En aprilo:
23an, 19an horon, prelego de *José María González Aboín*, "Mapoj kaj geografiaj nomoj"

En majo:
21an, 19an horon, prelego de *Carlos Andreu*, "Vojaĝo al Budapeŝto kaj Vieno", kun lumbildoj de *Lupe Sanz*.

(HEF-ofic.: Rodríguez S. Pedro 13 3º 7, 28015 MADRID, 4467980)

---

**HUMORO**

-Mia edzo laboras de unu monato ĉe bierfarejo.
-Kiel plaĉas al li?
-Mi ne scias. De tiam li ankoraŭ ne estis hejme.

---

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98 . MADRID - 28012

NIA VOĈO

Ekzempleroj: 175 Majo de 1990

## PRELEĜOJ EN M.E.L.

Kadre de la ĉiumonataj prelegoj, la 12an kaj 19an de marto, okazis en la sidejo de M.E.L. interesaj kaj belegaj prelegoj titolitaj "Sur la spuroj de Federico García Lorca". La preleganto estis nia samideano Miguel Fernández Martín, kiu kun majstra eleganteco skizadis la vivon kaj verkadon de nia universala andaluzo, kaj samtempe jen kantadis jen deklamadis. La ĉeestintoj, pli multenombraj ol kutime, ege kaj ĝue atentis la paroladon de Miguel, al kiu ili fervore ekaplaŭdis kelkfoje.

## ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

A.E.U. ofertas al vi:
1e.- La diskon "LP" (longdaŭra) KOSMO-INFANO, de la malaga muzikisto SOLO, kun modernaj kaj belaj kanzonoj en E-o..La disko estas registrita per nova sono-sistemo DAT, kiu ebligas la plej bonan sonon. Nur 1200 pesetojn (disko, teksto kaj sendo).
2e.- 1an INTERNACIAN RENKONTIĜON kaj 8an ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO en Torrox (Málaga), de la 7a ĝis la 14 de oktobro de 1990. Loĝigo kaj tri manĝoj en tre bela restadejo apud la plaĝo, en 2-, 3-, 4-, 5-, 6- kaj 7-litaj ĉambroj, ĉiuj kun necesejo kaj duŝejo. Prezo por la tuta semajno estas: 14000 pesetoj.
Informiĝu, mendu au pagu ĉe: A.E.U., Apartado 864, 29080 MALAGA.

## DUA EŬROPA FORUMO ĈE GIMNAZIO DE EVRY (FRANCIO)


Jam en la dua fojo, okazis tiu ĉi forumo, kiun partoprenis po dek aŭ dudek studantoj pri la franca el diversaj eŭropaj landoj. Inter ili, dudek gehispanoj el gimnazio de Salamanca, kaj ankaŭ nia suferanta tajpanto Marcos. Ĉiu aro da studantoj aranĝis ĉambron kiel standon por montri al aliaj pri sia lando. Okazis ankaŭ prelegoj kaj debatoj pri diversaj temoj rilate Eŭropon. La stando pri Esperanto, aranĝita de instruistino, ŝia patrino kaj Marcos estis sukcesa, kaj logis kelke da homoj, kiuj povis vidi afiŝojn, broŝurojn, poŝtmarkojn kaj librojn el multaj landoj. Estis ankaŭ komputoro per kiu oni povis studi Esperanton, kion multe ŝatis gestudantoj.

## E S P E R A N T A J   Ĉ E M I Z O J

Novaj "T-ĉemizoj" baldaŭ estos haveblaj por 600 pesetoj (Plus 10% sendokosto, plus 300 pes. bankokosto por ĉekoj ekster Madrido).
Estos rabato de 20% por aĉeto pli ol 20 ekzemplerojn.
Bonvolu jam mendi ilin al MEL. Antaupago necese.

NOVAĴO !!

Prezo : 600 pes.



## VENONTAJ PROGRAMOJ

ĉiu'unde je la 19a horo, konversacia rondo ĉe MEL (Atocha 98 4º)

16an de majo, merkredo, "Tertulia Amigos del Esperanto" ĉe Ateneo de Madrid
Strato Prado n-ro 21 je la 19.00 horo.

24-an de majo, jaudo, 19an horo, prelego de Carlos Andreu, "Vojaĝo al Budapeŝto kaj Vieno", kun lumbildoj de Lupe Sanz. okazos en la Centra Oficejo de HEF, strato Rodriguez San Pedro 13-3º

26-an de majo, sabato, ekskurso al vilaĝo MIRABUENO (Guadalajara), por partropeni en "Romeria de las Cruces". Informoj haveblaj en konversacia rondo ĉe MEL 21-an de majo.

## KARAVANO AL KUBO ORGANIZAS MEL

..... kaj ankaŭ postkongresan ekskurson al PERUO.
Interesatoj bonvolu peti informaoj de MEL. (Prezo proksimume 385.000 pes)

## VORTOJ DE ZAMENHOF

...Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas
paroli Esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia
nacia lingvo, kaj PROPORCIE AL LA NEKURAĜECO DE LA PAROLADO
APERAS ANKAŬ NEKURAĜECO DE PROPAGANDO, car la esperantistoj-
balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke
eble tamen(1) estas afero pli teoria, ol praktika...
...ni en ĉiuj niaj kongresoj, ne sole en la universalaj sed
ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, NEPRE DEVAS PAROLI NE SOLE
PRI ESPERANTO, SED ANKAŬ PER ESPERANTO.
(El parolado en St.Petersburg, 1910)
(1): Esperanto

## PRI LA AĈA TAJPADO

Komputoro estas riparata, kaj pro tio mi uzis tajpilon.
Neniam plu, mi esperas. Pardonon.
(Marcos)

**nia voĉo**
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98. MADRID - 28012

# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: 150 Junio de 1990


**MEL-KOTIZO POR 1990**


Ni denove petas al ĉiuj membroj kiuj ankoraŭ ne pagis siajn kotizojn por 1990, bonvolu sendi ĉekon po 1800 pesetoj je la nomo de Madrida Esperanto-Liceo.

**ESPERANTA ĤORO "VERDA STELO"**

La Esperanta ĥoro de Madrida Esperanto-Liceo "Verda Stelo", kiun kreis kaj gvidas Perico Villaroig, kaj kiu antaŭ deko da jaroj havis kelkajn gekantemulojn, nuntempe arigas 50 gekantistojn kaj 30 gemuzikistojn. Ĝi estis invitita en majo al Internacia Esperanta Festivalo en Volgograd (Sovetunio).

La ĥoro, kiu tre multe propagandas Esperanton en tuta Hispanio, jam partoprenis en kelkaj internaciaj festivaloj kaj konkursoj, kaj atingis plurajn diplomojn.

**AMTEMO**



Tiele: side, strande.
glutante la krepuskon en lontano
per bovlo kun mil ŝaumoj,
transpasi vin per amo, mia amo.

Jen sablo, ŝaloj
arĝentaj sur mar-haŭto infinita.
Jen kisoj, amo,
por am' kun mi eterne kunfandita.
Sed bojas hund'
en la profund'
de l' stranda grund',
fuĝas vi kun la brizo,
svenas la paradizo,
restas mi kaj la mar',
la horoj pluvas gutojn de amar'.

Tiele: kuŝe, kvere,
el niaj nudoj plekti ĝuo-skuon,
la lipojn sensi suplaj,
transporti nin per am' en la vakuon,
postlasi tempon
gravedan je kadavroj kaj mort-landoj,
la ŝosojn sperti
de flor-sezon' senfina sub la plandoj.

Sed la duel'
en hund-infer'
-daŭra sufer'-
iĝis prema koŝmaro
for de vi, ĉe la maro.

Nun mi revas en flam'
transpasi vin per amo, mia am'.

*Miguel Fernandez Martin*


**T-ĉemizoj jam estas pretaj.** Uzu ilin dum niaj kongresoj, renkontiĝoj kaj ekskursoj.

Petu rekte al Madrida Esperanto-Liceo po 600 pes. plus sendokosto (10%)

Antaŭpago neceze.




!!600 pes.!!!

**LIBRO-LISTO KOMPUTORIGATA**

La listo de libroj de HEF-oficejo estas komputorigata de *Marcos Cruz*. La komputora listo jam enhavas pli ol 500 librojn. Poste *Marcos* komencos komputorigi la libro-liston de MEL.

**VENONTAJ PROGRAMOJ**

Konversaciaj rondoj, je la 19a horo:
Ĉiulunde ĉe MEL.
Ĉiuĵaŭde ĉe HEF-oficejo.
**Oni daŭrigos la parol-rondon ĉe ATENEO en Oktobro (la trian merkredon)**
(HEF-ofic.: *Rodríguez S. Pedro* 13 3º 7, 28015 MADRID, 4467980)

**SALUT-LETERON**

Senatoro S-ro *José Prat* sendis salut-leteron al rondo "Amigos del Esperanto", kiu okazas monate ĉe Ateneo de Madrid, kiun li prezidas.

ATENEO CIENTIFICO, LITERARIO Y ARTISTICO
PRESIDENTE

Doña Lucrecia San Antonio
Madrid.

Distinguida amiga: Mil gracias por la afectuosa y singular felicitación navideña, con sus hermosos versos "El sueño de la Virgen María"

Y mi felicitación para Vd. y los suyos y para los "Amigos del Esperanto" =

Con un abrazo José Prat

---

Madrida Esperanto-Liceo
*Atocha* 98 4º
28012 MADRID

# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: Julio-Aŭgusto de 1990

## Helpon!

Pro manko de novaĵoj, Marcos Cruz, nuna tajpanto, petas de ĉiuj geesperantistoj bonvolu sendi siajn artikolojn, desegnaĵojn, anoncojn kaj sugestojn rekte al lia adreso: Acacias 44, 28023 MADRID. Helpu pliinteresigi Nian Voĉon! Ĝi estas tre eta, sed ofte ne estas facile ĝin plenigi! Helpon! Antaŭdankon al ĉiuj.




## Filmo pri Kvinpinta Semajno

Marcos Cruz alportos al la finna kongreso Kvinpinta Semajno, okazonta de la 23a ĝis la 29a de julio, videofilmilon kaj stativon. Per ĝi li faros filmon, kiu poste estos uzata kiel informilo; ĝin li uzos ankaŭ kiel varbilon por skeptikuloj.




## Konversaciaj Rondoj

- Ĉe MEL lunde je la 19a horo.
- Ĉe HEF-oficejo ĵaŭde je la 19a horo.
- Ĉe "Ateneo de Madrid" trian merkredon de julio je la 19a horo.




## Video-Servo

Ĉe Kanariaj Insuloj funkcias Video-Servo internacia. Pliaj informoj peteblas de: Esperanta Video-Servo, Espartero 1 3º 13, 35010 Las Palmas de G.C.

## Rok-Gazet'!

Ĵus aperis nova revuo, Rok-Gazet', en Francio. Temas pri ideo kiu naskiĝis dum la pasinta IJK en Nederlando. Per ĝi oni klopodos disvastigi Esperantan rok-muzikon en la rok-muzikan mondon. Tamen, la revuo ne temas nur pri Esperanta rok-muziko, sed ankaŭ pri ne-Esperanta roko, kaj eĉ pri ne-roka muziko! Adreso: EUROKKA, F-31450 DONNEVILLE, Francio.






## Kolekto

Marcos Cruz ĵus komencis kolekton de ĵurnalaj kaj revuaj artikoloj pri lingvoj, speciale pri la internacia lingvo-problemo. Per ĝi li montros realaĵojn al tiuj kiuj diras, ke estas nenia problemo tia! Li danke atendas viajn sendaĵojn (al adreso supre menciita).

## [illegible]

La 23an de junio Radio-3 [illegible] elsendis programon pri la lingvo-problemo en Eŭropo. Partoprenis la debaton tri homoj, franco, italo kaj



hispano (S-ro Antonio Rojas, verŝajne verkisto). Ĉiu estis en la ĉefurbo de sia lando, kaj parolis sian propan lingvon. Estis ridinde, ĉar ĉiu siavice legis siajn dek-minutajn paroladojn anstataŭ vere kaj reale debati! Komprenenble, debato neeblis pro la malsamaj lingvoj! Marcos Cruz telefonis al la radiostacio, por demandi kial ili ne menciis Esperanton, la plej facilan kaj neŭtralan lingvon, tute vivantan, kaj tiel plu. Fine de la programo, la hispana parolistino, S-rino Aurora de Andres diris: "Telefonis al ni KELKAJ tre koleraj homoj demandante kial ni ne uzas Esperanton!" Si tuj stultege iom ekridaĉis, kaj pridemandis al S-ro Antonio Rojas tion. Li ne respondis, sed parolis pri tute alia afero, fine dirante ke la angla estas la lingvo internacia por scienco, tekniko, kaj tiel plu... Estas hontinde, ankoraŭ aŭdi tiajn fiopiniaĉojn, precipe de homoj kiuj, almenaŭ teorie, havas minimuman konon kaj scion!




# GIS LA SEPTEMBRA NUMERO!




DISVASTIGU ESPERANTON PERE

DE T-ĈEMISON

PETU AL Madrida Esperanto-Liceo. PO 600 pes.

(480 pes se vi aĉetas pli da 20)



nia voĉo

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO

DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:

c/ ATOCHA nº98 . MADRID - 28012

# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Ekzempleroj: Septembro de 1990

## HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

*Miguel Fernández* prelegis sukcese pri *Federico García Lorca* dum Hispana Esperanto-kongreso en *Sant Cugat del Vallés*. Lia alt-nivela Esperanto kaj lia kono pri la verko de *Lorca* igis la gekongresanojn aplaŭdi. La prelego estis ornamita per poem-tradukoj kaj kantoj en Esperanto.




## SOMERUMI EN ESPERANTUJO

Kelkaj madridaj esperantistoj profitis somer-tempon por ferii kaj parto-preni en diversaj esperantaj aranĝoj: kongresumi en Finnlando, Kubo aŭ Barcelono; restadi en kastelo *Gresillon* (Francio); viziti korespondantinon en Ĉeĥoslovakio... Vere Esperanto estas utila, speciale por turismi.




## GLUEBLAĴOJ

La familio de *Demetrio Estévez* donacis al MEL centojn da ekzempleroj faritaj de ili. Ni kore dankas ilian malavaran donacon, kiun ni disdonos inter la partoprenantoj de la konversaciaj rondoj ĉe MEL.

## VENONTAJ PROGRAMOJ

Je la komenciĝo de septembro MEL rekomencos sian aktivadon, speciale rilate la preparon de novaj kursoj kaj, kiel kutime, petas vian helpon por disglui propagandaĵojn. Programeroj:

-Ĉiu-lunde ĉe MEL okazos konversacia rondo je la 19a h.
-Ĉiu-ĵaude ĉe HEF-oficejo okazos konversacia rondo je la 19a h.
-La 17an de septembro: *Juan Carlos Ruiz* prelegos pri la HEF-kongreso.
-La 1an de oktobro: Inaŭguro de baza kurso.
-La 15an de oktobro: *Juan Navareño* prelegos pri 75a U.K. en Kubo.
-La 17an de oktobro: Konversacio ĉe *"Ateneo de Madrid"* je la 19a horo.
-La 19an de novembro: *Marcos Cruz* parolos pri la kongreso "Kvinpinta Semajno" en Finnlando, per lumbildoj kaj eble ankaŭ vid-bendoj.
—La 17an de decembro: *Carlos Andreu* parolos pri "Ĉeĥoslovakio per mia korespondantino".
-La 21an de decembro: "Pasporta Servo en Francio", far *Juan Antonio del Castillo*.

## VENONTAJ KONGRESOJ

-2a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio, la 13an kaj 14an de aprilo de 1991 en *Alcantarilla (Murcia)*.
-3a Astura Esperanto-Kongreso, de la 12a ĝis la 14a de oktobro de 1990, en *Gijón (Asturias)*.

## T-ĈEMIZOJ

Danke al la klopodoj de *Lupe* kaj speciale de *Pedro* oni vendis sufiĉe da T-ĉemizoj dum somero, sed ankoraŭ restas kelkaj. *Marcos Cruz* sukcesis forvendi 16 T-ĉemizojn dum la kongreso "Kvinpinta Semajno" en Finnlando. Grupo de liceanoj promenis tra parko *Retiro* portante T-ĉemizojn, kaj multaj homoj demandis ilin pri Esperanto.

## GEEKSTERLANDANOJ VIZITIS MADRIDON



Dum someraj monatoj kelkaj geesperantistoj turismis en Madrido. Du finnaj gejunuloj restis unu semajnon en nia urbo kaj partoprenis en nia konversacia rondo kune kun brazilano, kiu multe parolis pri sia lando. Li denove venos al Madrido por labori. Nia kara *Ada Sikorska* restis du tagojn en Madrido kiam ŝi revenis de Kubo. Aliaj geesperantistoj telefonis MEL-on por anonci sian restadon en Madrido. Tial ni konis la viziton de ruso kaj aŭstralianino. "PA3FLC", radio-amatoro el Nederlando, vizitis MEL-on kaj parolis pri uzo de Esperanto en radio.

## GAJA JUNULARA KONGRESO EN FINNLANDO



*Marcos, Mónica kaj María Cruz* vojaĝis pasint-julie al Finnlando por partopreni Kvinpintan Semajnon, junularan kongreson organizitan de la kvin nordiaj landoj: Danio, Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Islando.
Tie troviĝis nia madridana liceano *Jorge Camacho*, kaj la kongreson ĉeestis ankaŭ aliaj gehispanoj.
Ĉion *Marcos* bone kaptis per fotilo kaj kamerao, kaj pri tio li baldaŭ parolos al madridaj geesperantistoj.
La sukcesan kaj gajan kongreson partoprenis preskaŭ 200 gejunuloj el ĉirkaŭ 20 landoj.
*Marcos* kaj *Jorge*, kun helpo de kataluno *Dani* kaj finnino *Riitta*, aranĝis ridigan teatraĵaĉon por la Internacia Tago, kiu certe vidindas - kaj baldaŭ videblos, vid-bende.


Remite:
Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98 4°
28012 MADRID

# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: Oktobro de 1990

=================================================================




## 46-A I.J.K.

Post la UEA-Kongreso en Havano, okazis en Kubo la junulara kongreso de TEJO. *Playa Girón* estis la kongresejo. Niaj amikinoj *Pepita* kaj *Mary Lis* partoprenis la kongreson kaj "suferis" la gasteman trajton de kubanoj.

## INTERNACIA EO-CENTRO EN KUBO

Ĉe la mar-bordo, la hotelo "*Hanabanilla*" estas la unika centro en Ameriko kiu aranĝas kursojn, prelegojn, kulturajn programojn, k.t.p. Petu pliajn informojn de: Kuba Esperanto-Asocio, PK 2018, Habana 2, Cuba.

## AUTOMATA TRADUKADO




"*Susy*", mallongigo el la germana nomo *Saarbrücker Übersetzungssystem*, estas traduk-sistemo kiu ekzistas ekde komenciĝo de la 70-aj jaroj kaj kapablas traduki germanen el la rusa, la franca, la angla, la dana, kaj Esperanto.

## VENONTAJ PROGRAMOJ


Je la komenciĝo de septembro MEL rekomencos sian aktivadon, speciale rilate la preparon de novaj kursoj kaj, kiel kutime, petas vian helpon por disglui propagandaĵojn. Programeroj:

- Ĉiu-lunde ĉe MEL okazos konversacia rondo je la 19a h.
- Ĉiu-ĵaude ĉe HEF-oficejo okazos konversacia rondo je la 19a h.
- La 15an de oktobro: *Juan Navareño* prelegos pri 75a U.K. en Kubo.
- La 17an de oktobro: Konversacio ĉe *Ateneo* je la 19a horo.
- La 19an de novembro: *Marcos Cruz* parolos pri la kongreso "Kvinpinta Semajno" en Finnlando, per lumbildoj kaj eble ankaŭ per vid-bendoj.
- La 17an de decembro: *Carlos Andreu* parolos pri "Ĉeĥoslovakio per mia korespondantino".
- La 21an de decembro: "Pasporta Servo en Francio", far *Juan Antonio del Castillo*.



## PAROLADO PRI HEF-KONGRESO

*Juan Carlos Ruiz* sukcese parolis ĉe MEL la 17an de septembro pri la pasinta HEF-Kongreso.



## FELIĈON!

La redakcio de Nia Voĉo sendas nome de ĉiuj liceanoj bondezirojn kaj feliĉon al *Maribel* kaj *Juan Carlos* pro ilia nova filino, kiu naskiĝis dum aŭgusto.

## GEORGO KAMAĈO EN MADRIDO


Nia kara Georgo jam estas en Madrido. Li venis el Finnlando kun kvin premioj de la literatura konkurso de UEA. Ni kalkulas je lia helpo po la altiĝo de la nivelo de Esperanto en nia grupo. Bonvenon!

## DEZIRAS KORESPONDI

Komencanto en Esperanto, partopreninto de la Kvinpinta Semajno, deziras korespondi kun hispanaj gejunuloj:
Alfredas Mazuska
P/K 50, SU-235250 PASVALYS (LITUANIA)

## ESPERANTO-EKSPOZICIO

*Marcos Cruz* klopodas aranĝi Esperanto-ekspozicion la 15an de decembro en la kultur-domo de *Majadahonda*. Estos en ĝi ne nur libroj, revuoj kaj ceteraj kutimaĵoj (poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj) sed ankaŭ: vid- kaj son-bendoj, kiujn la vizitontoj povu vidi kaj aŭskulti; fotografaĵoj el la 45a IJK kaj el la Kvinpinta Semajno; infanaj desegnaĵoj pri Esperanto; komputor-programo por lerni Esperanton; artikoloj pri Esperanto el ĵurnaloj kaj revuoj... Ĉiu kiu volas kunlabori, bonvolu sin turnu rekte al: *Marcos Cruz, Acacias 44, 28023 MADRID, tel: 7153873* (vespere). La organizanto serĉas iun ajn kiu havas ian ajn Esperanto-kolekton kaj povus almenaŭ pripensi eblecon pruntedoni ĝin. Fotografaĵoj kaŭ lumbildoj el kongresoj aŭ renkontiĝoj estas bezonataj, kun dato kaj loko. Ĉiu kontribuaĵo estos redonita. Dankon.





**nia voĉo**

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n° 98 . MADRID - 28012

# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: 175 Novembro de 1990




## MIĈJO RESUKCESIS


Kadre de la Astura Esperanto-Kongreso, *Miguel Fernández* prelegis pri "Tra la spuroj de *Federico García Lorca*". Ni enmetas komentarion pri la kongreso aperintan en revuo "Kajero de la suno":

«La prelego konsistis en profunda studo pri la plej gravaj viveroj kaj la signifo de la verkado de *Federico García Lorca*, disertacio dividita je du partoj: unu horo matene kaj sama tempo posttagmeze. K-do *Fernández*, tradukinto de teatraĵoj kaj multnombraj versaĵoj de *Lorca*, faris memorindan prelegon, unikan ĝis nun en nia Movado: li kantis, kiel granda artisto povas tion fari, t.e. kun emocio kaj arto, kanzonojn pri *"kanto-ĥondo"* tiel, kiel konceptis ĝin *Lorca*... Filo de granadano, kaj kiel *Lorca* granadano ankaŭ li mem, nia k-do *Fernández* rekreis tiun andaluzian etoson tiel profunde amitan kaj poezie priskribitan de la mita poeto (...)

La tuta prelego de nia k-do *Fernández* estis dissemita per pecoj da poemoj el la plej brilaj de *Lorca*: "Funebra kanto por *Ignacio Sánchez Mejías*", "Kasido pri la branĉoj", "Soneto pri la obskura morto", "Floro", "Ĝiso" k.a. (...), kaj ĉiuj ili estis deklamitaj tiel korsente, kaj pasiplene, ke emociaj larmoj ŝprucis nebremseble el la okuloj de granda parto el tiu publiko, tute ravita kaj freneze aplaŭdanta pli ol per manoj per la propra koro...

Ni gratulas kaj dankas nian kamaradon por tiu memorinda prelego, kiun ni certe neniam forgesos!»

## GELICEANOJ EN ASTURIO



Sep gemadridanoj partoprenis la 3-an Asturan Esperanto-Kongreson, kiu estis tre sukcesa kaj alt-kvalita. *Gijón* akceptis geesperantistojn el Eŭskadio, Galegio, Leon-Kastilio, Madrido, kaj kompreneble ankaŭ de Asturio. Labor-programo, diskutado pri la movado, interesaj prelegoj kaj distra programo estis atente sekvataj de gepartoprenantoj.



## GEORGO KAMAĈO PREMIITA

Kvin premiojn atingis Georgo en la Beletra Konkurso de UEA de 1990... En poezio: 2-an premion pro "Ĉies" kaj 3-an pro "Nokto". En prozo: 1-an premion pro "Kia la semo", 2-an pro "Mensogo de l' okuloj", 3-an pro "Sendestine". En eseo: Honoran Mencion pro "Amika rondo varma aŭ pri la verda junularo". Bedaŭrinde, pro sia laboro Georgo devos translokiĝi al Kanariaj Insuloj.

## *JUAN NAVAREÑO* KONGRESUMAS

Dank-al sia emerituleco, *Juan* abunde kongresumas. Li estis en Belgio en fervojista renkontiĝo kaj ankaŭ partoprenis la Andaluzan Kongreson en *Torrox* (Malago). Sed inter kongresoj li prelegis ĉe MEL pri sia sperto en la UK okazinta en Kubo.

## EKSPOZICIO PROKRASTITA

Pro ne sufiĉe da intereso flanke de la Kulturdomo de *Majadahonda* kaj ĉefe pro ne sufiĉe da tempo por fari vere indan aranĝon, Marko prokrastas la ekspozicion, probable ĝis venonta jaro. Marko tre dankas *Lupe* kaj *Juan Carlos,* kiuj volonte oferis sian helpon. Marko tuj komencos diskorespondi internacie por havigi al si turismajn kaj radiostaciajn broŝurojn, geinfanajn desegnaĵojn k.t.p.



## KRISTNASKA LOTERIO

Kiel tradicie, MEL vendas loterion kiel financan helpon. Ni bezonas vian kunlaboron por disvendi. MEL interŝanĝos po 500 pesetoj el sia numero (06060) por numeroj de aliaj grupoj. Bonvolu sendi biletojn al MEL antaŭ la 10a de decembro; ni tuj sendos niajn.

## PLI BELA KATALOGO

La oktobra katalogo de Libroservo de HEF ŝajnas pli bela ol antaŭaj. Ĝi verŝajne estas nun presita, ne tajpita, do ĝia ŝajno ne estas tiel "aĉa". Krome, se oni mendas ion, estas eble ankaŭ aliĝi al UEA aŭ HEF aŭ eĉ aboni revuojn kiel Heroldon de Esperanto, Monaton kaj aliajn. Petu informojn de: Libroservo de HEF, *Apartado 119, 43080 Valladolid.*

## ONTAJ PROGRAMOJ KAJ KONGRESOJ

En novembro:
* Ĉiu-lunde ĉe MEL okazas konversacia rondo je la 19a horo.
* Ĉiu-ĵaŭde ĉe HEF-oficejo okazas konversacia rondo je la 19a horo.
* 14-an: "*Tertulia Amigos del Esperanto*" ĉe *Ateneo de Madrid.*
* 19-an: Marko lumbilde prelegos pri "Kvinpinta Semajno en Finnlando".

En decembro:
* 17-an: Prelego de *Carlos Andreu,* "Ĉeĥoslovakio per mia korespondantino"

En aprilo de 1991:
* 13-an kaj 14-an: 2-a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio. Loko: *Alĉantarilla* (Murcio). LKK: *Santa Teresa 10, bajo A, 30005 MURCIA.*

En julio de 1991:
* 20-an ĝis la 27-a, IJK en *Karlskoga* (Svedio).
* 27-an ĝis la 3-a de aŭgusto, UK en *Bergen* (Norvegio).

(Aliĝilojn de UK kaj IJK vi petu de Marko, la komputortajpanto.)

(Komputortajpanto: Marko C.M., Acacias 44, E-28023 MADRIDO, tel.: 7153673, vespere)

Remite:
Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98 4°
28012 MADRID

# Nia Voĉo


Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: *80* Decembro de 1990

=================================================================

## GENERALA ASEMBLEO

La venonta asembleo de MEL okazos la 28an de januaro, je la 19a horo. Por mallongigi la daŭron oni antaŭdiskutos la diversajn punktojn en la konversaciaj rondoj kiuj okazas ĉiun lundon je la 19a horo.



| Punktoj de l' tagordo: | Antaŭdiskuto: |
| --- | --- |
| 1. (Mal)aprobo de la antaŭa protokolo. | 10an de decembro |
| 2. Resumo de MEL-aktivaĵoj dum 1990. | 17an de decembro |
| 3. Bilanco de 1990. | 7an de januaro |
| 4. Buĝeto de 1991. | 7an de januaro |
| 5. Venonta programo de MEL. | 7an de januaro |
| 6. Elekto de novaj estraranoj. | 14an de januaro |
| 7. Demandoj kaj komentarioj. | 21an de januaro |

(La 4a punkto estas tre grava, ĉar ni petos monan helpon de la orkestro kaj koruso, kiuj ambaŭ uzas nian sidejon kiel provejon. Krome, la banko plialtigis la kostojn de la perad-kotizoj, do MEL-anoj devos pagi rekte al MEL aŭ la kotizo devos esti plialtigita.)



## KOTIZO POR 1991

Se vi deziras faciligi la laboron de nia kasisto, bonvolu pagi vian tutjaran kotizon (1800 ptojn). Se vi sendas ĉekon, ĝi estu 2000-peseta, pro banko-pera kosto.

## NIA VOĈO DUM 1990 – KAJ 1991

La estraro de MEL kore dankas al ambaŭ *Lupe Sanz* kaj Marko pro ilia laboro pri la redaktado, kompostado kaj dissendado de Nia Voĉo dum 1990. Nia modesta bulteno estas la nura ligilo kun la plej granda parto de membroj de MEL kaj aliaj Esperanto-grupoj. Pro tio ĝia elsendo devos akurate daŭri venontan jaron. (Por gescivoluloj: Nia Voĉo estas kompostata far Marko per komputoro *Sinclair QL*, 3a versio de teksto-prilabora programo *Text87* kaj presilo *Star LC24-10*.)

## ZAMENHOFA FESTO

La 15an de decembro ni celebros Esperantan Tagon per tagmanĝo, kies lokon ni ankoraŭ ne decidis. Geinteresatoj telefonu lunde, de 19a ĝis 21a horoj al MEL (2308798).

## ERARA LOTERI-BILETA NUMERO

En novembra Nia Voĉo ni erare anoncis la loterian numeron de MEL. Notu, ke la korekta numero estas **60060**. Ni jam disvendas ĝin.

## HEF-OFICEJO

*Pedro A. Garrote* gvidas perfektigan kurson ĉe HEF-oficejo (*Rodríguez San Pedro 13 3º 7*, tel: 4468079). La gelernantoj sekvas la EK-metodon verkitan far *Dennis Keefe*.


Dum la 3a Astura Kongreso en *Gijón*, la prezidanto de HEF promesis al la gemadridanoj instali aŭtomatan respondilon ĉe la telefono de HEF-oficejo en Madrido. Ĝi ankoraŭ ne pretas, sed ni esperas ke venontan monaton ĝi jam estos funkcianta.



## REVENO DE ESPERANTISTO

*Gregorio González del Campo*, kiu lernis Esperanton antaŭ kelkaj jaroj, revenis al MEL kun novaj fortoj por aktualigi sian konon pri la internacia lingvo. *Pedro A. Garrote*, nia nuna kaj nura instruanto, akceptis instrui bazan kurson por altnivelaj gelernantoj. Ĝi okazas ĉiun lundon ĉe MEL.

## INFORMADIKA REVUETO



Marko esperas eldoni komence de 1991 unuan numeron provan de INTERO (INformadika Tutmonda Esperantisma RevuetO), komputore kompostitan kaj poste fotokopiitan. Por tio li jam komputorumas adresaron ĝis-nune enhavantan preskaŭ 200 nomojn de homoj kaj asocioj al kiuj ĝi estos dispoŝtita. *Miguel Gutiérrez Aduriz*, nia samideano el *Santander*, jam oferis sian apogon al la afero. Samtempe Marko komencis verkon de serioza informadikaj Esperanto-vortaro kaj angla-Esperanta vortlisto. Bonvolu ĉiu interesato pri la afero, ĉu por aboni aŭ kunlabori, sin turni al li.

## NOVA LIBRO DE *LUPE*

*Lupe Sanz* eldonis libron, titolitan "*Uceda: notas sobre su historia, arte y costumbres*". En 406 paĝoj ŝi rakontas preskaŭ ĉion pri tiu vilaĝo de la provinco *Guadalajara*, kie naskiĝis ŝia patrino.

## ONTAJ PROGRAMOJ KAJ KONGRESOJ

En decembro:
* Ĉiu-lunde ĉe MEL okazas konversacia rondo je la 19a horo.
* Ĉiu-ĵaŭde ĉe HEF-oficejo okazas konversacia rondo je la 19a horo.
* 17an: *Carlos Andreu* prelegos: "Ĉeĥoslovakio per mia korespondantino"

En aprilo de 1991:
* 13an kaj 14an: 2-a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio. Loko: *Alcantarilla* (Murcio). LKK: *Santa Teresa 10, bajo A, 30005 MURCIA.*

En julio de 1991:
* de 20a ĝis 27a, IJK en *Karlskoga* (Svedio).
* de 27a ĝis 3a de aŭgusto, UK en *Bergen* (Norvegio).

(Kompostinto de Nia Voĉo: Marko, Acacias 44, E-28023 MADRIDO, tel.: 7153873, vespere)

**Feliĉan kaj Esperantplenan novan jaron al ĉiuj!**

Remite:
Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98 4°
28012 MADRID